

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)
Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.
Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 3, n-ro 1 (13): majo-junio 2010
Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas.
Helpu nin disvastigi nian revuon!
Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47
Retadreso: pieter.doumen@telenet.be

Karaj Gelegantoj,

Ni denove atentigas vin pri la grava iniciato de la Flandra Esperanto-Ligo organizi Beneluksan Kongreson de Esperanto en Antverpeno de la 13-a ĝis inkluzive la 16-a de majo 2010. Ĉiuj landoj, kie ekzistas Esperanto-Asocio organizas ĉiujare nacian kongreson. Tiu ĉi kongreso volas esti la nacia kongreso samtempe de Belgio (Flandrio, Bruselo kaj Valonio), Nederlando kaj Luksemburgio. Jam delonge ne okazis nacia kongreso en nia lando. Tamen estas necesege atenti la grandan publikon pri nia lingvo kaj montri, ke ĝi estas ankoraŭ vivoplena kaj plene taŭgas por ĉiuj rilatoj inter homoj kun diversaj gepatraj lingvoj. Verŝajne kaj espereble la kongreso estos organizata estontece ĉiujare en alia land(part)o. Por pli da informoj kontaktu la Flandran Esperanto Ligon, Frankrijklei 140, 2000 Antverpeno, tel. +32(0)3-234.34.00 aŭ sekretario@fel.esperanto.be.

Verŝajne ankaŭ la suno partoprenos en la kongreso, ĉar oni anoncis al ni, ke la somero jam komenciĝis (pli ol 25° celsiaj)!

Pieter-Jan Doumen

Vivo de D-ro Zamenhof (1)

(Leven van Dr. Zamenhof (1))

Ludoviko Lazaro Zamenhof naskiĝis la 15-an de decembro 1859 en juda familio en la nord-orienta pola urbo Bjalistoko, kiu tiutempe apartenis al la rusa imperio.

Lia patro, Marko Zamenhof, aŭtodidakto, estas instruisto de la franca kaj la germana lingvoj en la loka gimnazio. Krome li estis oficiala recenzisto de ĉiuj judaj publikaĵoj en la regiono. Lia patrino, Rozalia Sofer, pia kaj bonkora virino, instruis al la knabo, ke ĉiuj homoj estas fratoj.

Ludoviko estis la plej aĝa el naŭ infanoj: kvin filojn – li mem, Felikso, Leono, Henriko

kaj Aleksandro –, kaj kvar filinojn – Sara, Fania, Aŭgusta, kaj Ida.

En la urbo loĝis kvar popoloj kun diversaj lingvoj kaj religioj: ortodoksaj rusoj, katolikaj poloj, protestantaj germanoj kaj judoj. Tiu lasta grupo konsistigis 60% de la enloĝantaro. La aliaj popolgrupoj timis kaj malamamis ilin, sekve de la tiutempa mondvasta antisemitismo. Inter 1859 kaj 1900 okazis dudek naŭ kontraŭjudaj amasfuriozaĵoj!

Lia patro, kiu ne plu praktikis la judan religion kaj deziris plene integriĝi en la rusa socio kaj kulturo, faris el la rusa la hejmlingvon.

Jam kiel infano Ludoviko multe suferis pro la malamikeco inter la loĝantoj de sia naskiĝ-urbo, precipe kontraŭ la judoj. Tial li decidis dediĉi sian vivon al la interfratiĝo de la homoj. Vidante, ke la manko de interkompreniĝo estas grava kaŭzo de tiu sociala mizero, li baldaŭ konvinkiĝis, ke unu komuna, neŭtrala lingvo estas tio, kion la homaro plej multe bezonas. Tiam ekestis ĉe li la ideo de internacia lingvo.



Marko Zamenhof

Rozalia Sofer

Ekde sia deka jaro li vizitis la reallernejon en Bjalistoko, sed kiam lia patro ricevis postenon de instruisto en Varsovio, la tuta familio tien transloĝiĝis, kaj li daŭrigis siajn studojn en la tiea gimnazio. Li estis tre bona lernanto, kaj oni nomis lin afekcie “Lutek”.

Jam dum siaj gimnaziaj jaroj li laboris pri sia lingvo, kaj komence li ellaboris vastan gramatikon kun komplikaj konjugacioj kaj deklinaĵoj laŭ la ekzemplo de la latina kaj la greka lingvoj. Sed eklernante la anglan, li komprenis, ke gramatiko povas esti tute simpla, kaj li forigis ĉion nenecesan. Tamen la dikaj vortaroj de la naciaj lingvoj timigis lin. Iutage li hazarde atentis pri du elpendaĵoj de butikoj, sur kiuj li legis samsufiksojn rusajn nomojn, kaj li komprenis, ke sufiksoj kaj prefiksoj povas konsiderinde maldikigi vortaron.

En 1878 lia projekto “lingve universale” estis preta, kaj la 5-an de decembro li festis kun kelkaj kamaradoj la naskiĝon de la nova lingvo. Ili eĉ kantis kanton en tiu lingvo. Sed kiam post duona jaro li finis la gimnazion, la kamaradoj forgesis la aferon, kaj li postrestus sola kun sia lingvo.

Sed nun lia patro ektimis, ke lia filo frenezigos, se li plu okupiĝos pri tiu stulta ideo, kaj antaŭ ol Ludoviko iris al Moskvo por studi medicinon en la universitato, li devis liveri ĉiujn siajn manuskriptojn al la patro kaj promesi ne plu okupiĝi pri sia lingvo, ĝis kiam li finos siajn studojn. La patro promesis gardi ĉiujn dokumentojn, sed anstataŭe bruligis ilin. Tamen nenio perdiĝis, ĉar Ludoviko havis ĉion en sia kapo.

Dum tiu tempo li tamen iam kaj iam tradukis tekstojn en sian lingvon kaj verkis poemojn, kiel la konata *Ho, mia kor'*, en kiu li esprimas sian malesperon kaj solecon. Malkovrante nepraktikajn gramatikaĵojn kaj malglataĵojn, li daŭre plibonigis kaj perfektigis sian lingvon.

En 1885 li finis sian medicinajn studojn kaj poste specialiĝis kiel okulkuracisto en Vieno.

La 26-an de julio 1887 li eldonis proprakoste ruslingvan broŝuron kun la titolo “Lingvo Internacia de D-ro Esperanto”. Ĝi enhavis la 16 bazajn regulojn de la gramatiko, vortaron de ĉikaŭ 900 radikoj, prefiksoj, sufiksoj kaj finaĵoj, kaj kelkajn tekstojn kaj versojn en la nova lingvo.

(*Daŭrigota*)

Vere okazintaj faktoj

(*Waar gebeurdz, feiten*)

Novzelando – *Viro malsanigas sian edzinon* – Enloĝanto de Novzelando, kiu estas HIV-pozitiva, injektis sian propran sangon en sian edzinon, dum ŝi dormis. Tiel la virino estis infektita de la viruso, kiu kaŭzas aids-on. “Mi pikis vin, ĉar mi volis, ke vi estu tia, kia mi, por ke vi povu vivi kun mi kaj ne forlasu min,” li poste deklaris al sia 33-jara edzino. La virino



deklaris al la polico, ke ŝia edzo pikis ŝin dufoje dum ŝia dormo per injektilo, sur kiu gluiĝis infektita sango. Jam longe la paro spertis interrilatajn problemojn, ĉar la virino rifuzis seksumi kun sia edzo, timante esti infektita per aids-o. La 35-jara viro konfesis la faktojn kaj sidas nun en malliberejo. Li riskas ricevi prizonpunon de maksimume 14 jaroj. La viro malkovris sian malsanon, kiam ĉe lia alveno en Novzelando, lia sanstato estis kontrolita.

Sunday Star-Times




Germanio 1 – *Uzo de malpermesita veturilo* - Grupo da trajnfanatikuloj povas atendi prizonpunon, post kiam la lokomotivo, kiun ili mem fabrikis, estis plukita de la fervojo. La veturilo, kiu estis farita el ĝardenmebloj kaj recicligitaj trajnpartoj kaj povis transporti ses personojn, estis propulsata de elektromotoroj.

La polico de Erfurt estis alarmita, kiam loĝantoj de la domoj ĉe la fervojo vidis ruliĝi la strangan veturilon sur la trajnreloj. La polico devis peti la helpon de helikoptero, ĉar per siaj aŭtoj ĝi ne povis sekvi la improvizitan lokomotivon laŭlonge de la fervojo. Danke al la piloto de la helikoptero, kiu transdonis per sia radio la pozicion kaj direkton de la veturilaĉo, oni povis instaligi barikadon ĉe la stacidomo, en kies direkto veturis la stranga maŝino kaj tiel haltigi ĝin. Intertempe oni jam petis la fervojan kompanion haltigi ĉiun cirkuladon, kvankam la hobiistoj planis sian veturon dum tempo, kiam ne estis planita alia trajncirkulado.

Ŝajnis esti plano, kiu naskiĝis en kafejo kaj estis plenumita, sen ke la iniciatintoj konsciis, ke ili povus kaŭzi gravan akcidenton, se ili renkontus veran trajnon. La ses viroj estis arestitaj pro uzo de veturilo sen permeso.

Germanio 2 – Kripligita angla lingvo en EU – Günther Oettinger [ginter etinger], eksĉefministro de Baden-Virtembergo, germana membro de la Eŭropa Komisiono, ridigas la homojn per sia nekomprenebla kripligita angla lingvo. La germanaj amaskomunikiloj nomas la anglan lingvon de la plej alta germano en Bruselo, la 56-jara eŭropa komisaro pri energio, Günther Oettinger, vera honto. Tamen kiel ĉefministro de Baden-Virtembergo li ofte insistadis pri la neceso kapabli flue paroli tiun mondlingvon. Sur You-Tube [ju-tjub] videblas filmeto de prelego, kiun faris Oettinger en Berlino en decembro 2009. Li komencas per “Senk ju” kaj kuntredadas nekompreneblajn vortojn, ĉar lia prononco de la angla estas vere abomeninda. Instruistoj de la angla uzas sian paroladon kiel ekzemplon de malbona angla lingvo. Oettinger intencas poluri sian anglan lingvon en Bruselo poste, precipe la terminojn de sia propra faktereno. Preskaŭ 1,5 milionoj da germanoj reagis negative sur YouTube. Pri tio li ne ĉagreniĝas.



En la germana politika supra bona mastrado de la angla estas plie maloftaĵo. La antaŭaj kancelieroj Kohl kaj Schröder parolis nur la germanan en siaj kontaktoj kun eksterlandanoj. Ankaŭ la nuna registarestro, Angela Merkel, ne flue parolas la lingvon de Ŝekspiro. Tamen ŝi parolas ĝin pli bone, ol sia Ministro pri Eksteraj Aferoj, Guido Westerwelle. Cetere Günther Oettinger havas bonan ekzkuzon: ankaŭ lia germana ne estas senmakula. “En Baden-Virtembergo oni parolas la svaban

dialekton”, deklaras prof. L. Volkmann, “kaj la svaboj estas konataj pro ilia forta loka prononcmalmaniero, en kiu sinjoro Oettinger ankaŭ elstaras.”

Belgio 1 – Juna serbino falis de sesa etaĝo – La pasintan merkredon 34-jara beboartistino falis el apartamento de la sesa etaĝo en Antverpeno, kiam balustrado antaŭ fenestro malfiksiĝis. La virino ne transvivis la falon.

“Mi sidis kun la dorso turnita al la fenestro, kiam mi subite aŭdis tintadon, kvazaŭ falus tuta sako da ŝlosiloj”, rakontas Anna Vanthemse [vantemse] de la beleca salono *La Perlo* en la teretaĝo de la numero 15 ĉe la Avenuo Van Eyck [van ejk]. “Oni ne povas kredi, kian malagrablan bruon tio faras, kiam oni aŭdas ĉiujn tiujn ostojn kraki. Mi tuj eliros rigardi. Ne estis bela vidaĵo. La viktimo – mi tuj vidis, ke ŝi ne estas la loĝantino de tiu apartamento – ŝajnis al mi ankoraŭ konscia.”

Sed kio precize okazis? La serba loĝantino de la apartamento devis iomete kromlabori merkrede posttagmeze kaj petis amikinin, 34-jaran serbinon, iri preni ŝiajn du infanojn ĉe la baza lernejo je la dekdue.

Alia amikino de la patrino, ankaŭ serbino, kun siaj tri infanoj, sonorigis tie ĉe la pordo ĉirkaŭ la 12h50. Ambaŭ virinoj estis irontaj kune kun siaj infanoj al nagejo en la posttagmezo. La beboartistino venis al la fenestro rigardi, kiu staras malsupre ĉe la antaŭpordo. En tiu momento la balustrado antaŭ la fenestro ekrompiĝis. La virino falegis malsupren de la sesa etaĝo kun la kradeto. Ŝi frakaŝiĝis sur parkita Toyota kaj la biciclovoĵeto. Ankaŭ la tri infanoj vidis ĉion okazi.

La serbino estis transportita en kritika stato al malsanulejo. Post kelkaj reanimadaj provoj ŝi mortis de siaj vundoj.

Belgio 2 –Ĉeĥa interpretisto por flandrino – Akcepto en eksterlanda malsanulejo tute ne estas ridindaĵo. Tion spertis la 76-jara sinjorino Gerinjo Molenaar el Hechtel-Eksel, Flandrio, Belgio.

Ĉiujare la brava maljunulino vojaĝas al Usono, kie loĝas sia filo Petro. Sabaton, la 7-an de novembro, la lastan tagon de ŝiaj ferioj en Usono, io grave malsukcesis. Dum ŝi faris sian pakaĵon, la maljuna sinjorino stumblis kaj falis sur la plankon. Rezulto: rompita nuko kaj tuja transporto al malsanulejo. Post kiam evidentiĝis, ke ŝiaj brakoj kaj kruroj paraliziĝis, Gerinjo estis transflugigita al la Universitato

Malsanulejo de Harrisburg, ĉefurbo de Pensilvanio, unu el la plej elstaraj usonaj klinikoj.

“Mi pensis, ke tie ĉio estos bone aranĝita”, diras sia alia filo Vinando, kiu tuj, post kiam li ricevis la novaĵon de la transporto de sia patrino al malsanulejo, prenis aviadilon al Harrisburg. “Mi ne sciis, ke la plej granda mizero estis ankoraŭ venonta.”

Gerinjo ja scias nenian anglan vorton, kaj Vinando ne rajtis traduki. Post longa serĉado la malsanulejo trovis interpretiston. “Ĉeĥo,” suspiris Vinando. “Por la usonanoj la nederlanda lingvo eble similas al la ĉeĥa, sed tio tute ne helpis mian patrinon.”

Finfine oni elpensis praktikan solvon. La geflegistoj faris grandajn plastizitajn kartojn, sur kiuj estis anglaj frazoj kun sub ili la nederlanda fonetika traduko. “Tiel ‘movu viajn piedojn’ estis skribita kiel ‘bavaych yur vooten’,” diras Vinando. “La lingvobariero kaŭzis la neeviteblajn komikajn scenojn, sed ili faris sian eblon. Sed ial ĉiuj pensis, ke pli laŭta parolado solvas la komunikadproblemon, kaj tial mia patrino konstante havas laŭte krientajn kuracistojn ĉirkaŭ ŝi. Kompreneble tio tute ne helpas, ĉar ŝi ne estas surda”.

Ĉi-momente la sanstato de Gerinjo estas stabila, kaj plej laste fine de la semajno la familio esperas povi reflugi ĝin al Belgio.

Belgio 3 – *Infaneto savas siajn gepatrojn* – “Sen Flora ni ne starus ĉi tie”, konscias panjo Suzana. “Nia filineto vekis nin, post kiam la tegmento de nia vilao ekbrulis.” La nederlanda familio van der Linden loĝas jam dek jarojn en Belgio. Pasintdimanĉe Arturo kaj Suzana festis la 5-an naskiĝdatrevenon de sia filineto Flora en la ĝardeno malantaŭ sia domo en Schoten. Antaŭ la enlitiĝo ĉio estis reordigita. “Sed cindrujo kaj kelkaj petrololumetoj restis sur tablo kontraŭ la malantaŭa fasado,” rakontas Arturo. “Eble io estis ankoraŭ subbrulanta. Pro la vento ekbrulis la tablotuko, kaj poste ankaŭ la defluiga tubo.”

Iomete poste la tegmento de la vilao estis parte en flamoj. Flora vekigis ĉirkaŭ la du 2-a, dum ŝiaj gepatroj estis sinkintaj en profundan dormon.

“Mi flaris ion”, diras la knabineto, “kaj mi aŭdis fali tegolojn malsupren. Mi kuris al la ĉambro de panjo kaj paĉjo kaj diris, ke estas fajro en mia ĉambro.”

Ŝiaj gepatroj tuj eksaltis el la lito kaj avertis la fajrobrigadon. Suzana elkuris kun sia filineto eksteren, kaj Arturo provis estingi la fajron.



Kelkajn minutojn poste ili ricevis helpon de la fajrobrigadistoj.

“Granda parto de la tegmento estas detruita”, diras la komandanto de la fajrobrigado. La viroj de la Civila Protekto venis lundon meti tendotukon sur la tegmenton.

Feliĉe ĉio bone finiĝis. Tamen la domo estas grave damaĝita. Provizore la familio van der Linden loĝas ĉe najbaroj.

Prozaĵo: Bura¹ geedziĝo

(Proza: Een Boerenbruiloft)

Ĉe bura kampara geedziĝfesto la gastoj ekaperas en nombroj tre mirigaj al tiu, kiu nur trarajdas la dise loĝatajn ebenaĵojn de la karuo². Dum la suno plialtiĝis, rajdantoj sur diversspecaj ĉevaloj aperas el ĉiu direkto, aldonas siajn selojn al la longaj vicoj ĉe la muro, manpremas, trinkas kafon, kaj staras ekstere en grupoj, por rigardi la alvenantojn.

El la kaleŝoj kaj veturiloj venas masivaj virinoj kun belaj filinoj, kaj ilin sekvas svarmoj da infanoj ĉiuagaĵaj kaj ĉiumaniere vestitaj, prizorgataj de vartistinoj hotentotaj, kafraj, kaj duonnegraj, kies multspecaj vizaĝkoloroj, variantaj de palflava ĝis ebena nigra, aldonas diversecon al la sceno vivoplena.

Ĉie regas ekscito kaj moviĝado, kiuj laŭgrade pliiĝas, ĝis la reveno de la novgeedzoj. Festenaj preparoj aktive plenumiĝas en la kuirrejo; oni malavare disdonas kafon, kaj dum profunda sensacio kaj pafado la ĉevala veturilo aperas ĉe la pordo, kaj elpaŝas la novgeedzoj

¹ Temas pri la buroj en Sudafriko..

² Ofta arbusto en tiu regiono.

kun sia sekvantaro. Ili solene marŝas al la geedziĝa ĉambro, kie la lito kaj la kesto estas ornamitaj per blankaj rubandoj kaj artefaritaj floroj, kaj kie sur vico da seĝo la ĉeestantoj solene sidiĝas. Post kelka tempo la honoraj gefraŭloj leviĝas, kaj ceremonie enkondukas ĉiun gaston aparte por esprimi siajn bondezirojn kaj por kisi la novgeedzojn.


Tiam oni surtabligas la manĝaĵojn, kaj la suno preskaŭ subiras, antaŭ ol oni formetas la pladojn kaj komencas la plezurojn de la festo. Oni forprenas ĉion krom la seĝoj el la granda antaŭĉambro; la kota planko, zorge frotita per bovosango, rebrilas kiel polurita mahagono. La ina duono de la kunvenintaro sin retiras en flankĉambrojn por sin vesti por la vespero, kaj reaperas vestita per blanka muslino, gajaj helaj rubandoj kaj latunaj juvelaĵoj. Tuj kiam fiksiĝis la unuaj sebkandeloj ĉirkaŭ la muroj, oni komencas danci, dum en angulo de la ĉambro du violonistoj provizas la muzikon.

La edzo kaj la edzino komencas la balon, kaj baldaŭ la planko kovriĝas per rondirantaj paroj, kaj ĉiuj gajiĝas. La novgeedzoj libere miksiĝas kun la aliaj, kaj tie kaj tie iu muzikamanto laŭte kantas, dum li tiras sian kunulinon tra valso aŭ polko. Knaboj kriegas kaj aplaŭdas, kaj la ĝuo kaj konfuzo estas intensaj, ĝis alvenas la dek-unua horo. Inter la infanoj, ĉirkaŭsvarmantaj en la flankĉambroj fariĝas ne



Monumento de la Buroj en Pretorio

plu eble konservi silenton, eĉ per disdono de panbuloj kaj kukoj; aŭdiĝas ĝenerala kriado kaj plorado, kiuj leviĝas super la gratado de la violonoj; kaj la patrinoj forkuras de siaj kundancantoj por kunfrapi malgrandajn kapojn, orefrapi senatentajn vartistinojn, kaj premi la plorantojn en neokupatajn angulojn de litoj, sub tablojn kaj post kestojn. Post duonhoro ĉie aŭdiĝas ĉiu speco de infanronkado, kaj fariĝas



danĝere levi aŭ mallevi piedon en la flankĉambroj pro la eblo surtreti etan kapon aŭ manon.

Nun ankaŭ la okupataj piedoj jam rompitis la solidan supraĵon de la planko, kaj leviĝas polva nuboj, kiu faras flavan glorkronon ĉirkaŭ la kandeloj kaj tusigas la astmulojn; ĝi pli kaj pli densiĝas, ĝis oni ne povas rekoni iun ajn ĉe la kontraŭa flanko de la ĉambro, kaj oni vidas la vizaĝon de sia kunulo nur tra flava nebuleto.

Je la noktomezo oni kondukas la novedzinon en la geedziĝoĉambrojn kaj senvestigas ŝin. Oni estingas la lumojn, kaj la honora fraŭlo kondukas la novedzon al la ĉambra pordo kaj donas al li la ŝlosilon. Tiam oni fermas kaj ŝlosas la pordon, kaj la festo pli kaj pli laŭtiĝas. Neniu pensas pri dormo antaŭ la tagiĝo, kaj troviĝas neniu neokupata loko, en kiu oni povis dormi.

El "Romano pri Afrika Bieno" de Olive Schreiner – trad. S.A. Andrew (1934)

Poezio: La vivo de Prometeo (2)

(Poëzie: Het leven van Prometheus (2))

Ija, la estonta patrino de Peo, trovis vunditan fremdulon en arbaro, kiun ŝi prizorgis, nutris kaj trinkigis.

Ŝi rigardis, li ridetis,
tranĉa kling' jam preskaŭ pretis,
kaj laboris li sen bru'
en la freŝmatena fru'.
Per fortika ligna peco
li elpemis kun certeco
ŝtonajn erojn el silik'.
Estis tiu ŝtonteknik'
ne kutima tro por Ija,
estis io fantazia.
Tial ŝi kun interes'

per rigard' ĝis finsukces'
 sekvis laboradon lian.
 Poste figprovizon plian
 ŝi prizorgis por la manĝ',
 kaj foriris post l'aranĝ'
 tiufoje malrapide;
 tristis la rigard' humide.
 Venis nova tago, kaj
 ŝi revenis en malgaj'.
 Pluvis ja, kaj ke por anoj
 estu novaj terkabanoj,
 morgaŭ frumatene gent'
 aliloken en taĉment'
 por konstrui ilin iras.
 Adiaŭi ŝi deziras,
 sed rakontis al l'amik'
 tion ŝi nur per mimik'.



Ĉu sukcesis li kompreni,
 mi ne povas nun diveni;
 eble ne, sed eble jes.
 Ŝi sin premis kun kares'
 al la viro fremdagenta:
 li ne estis senatenta.
 Oni diras: malproksim'
 ĉiam pli altiras nin.
 Fremdaj inoj pli allogas,
 amon nur fremdul' elvokas.
 La knabino do frivolis,
 kun fremdulo ampetolis,
 sed pri tio – eĉ ne vort',
 ĉar la puno estis mort'.
 Tre observis la aĝuloj
 la plenumon de l' reguloj.
 Estis tia vivpostulo:
 ne kontaktu kun fremdulo!

Tial, certe, ne hazarde
 Ija agis tre singarde:
 al fremdulo venus fin'
 se gentan' ekvidus lin.
 Kaj samtial ĉe la fonto
 ŝi sin lavis, ke vidonto
 ne konjektu pri l' deflor',
 pri la krimo de amor'.
 Tiam mano ŝin haltigis,
 kaj al senmovec' instigis
 la amik' el fremda gent',
 atentigis pri l' silent'.
 Ŝi ŝtoniĝis tuj, kaj vidas:
 iu best' al roj' rapidas.
 Nesingarda kapreol'
 jen saltetas kun petol'.
 Same staras li ne vane
 kun ĵuspreta lanc' enmane.
 Streĉa atendado – sving'!
 Beston trais ŝtona kling'.
 Falis besto tuj sen spiro;
 bona trafo kaj akiro!
 Ija staras, sin ne movas.
 Kiu manĝos ĝin. Ĉu li?
 Ĉu ne tro por unu li?
 Nerostitan? Se li rostos,
 tra l'arbaro fumo vostos.
 Krome, dio aŭ hero'
 al li fajron portos do?
 Lia gento malproksimas.
 Ŝi? Kun la konfes' ke krimas,
 portos ĝin al sia gent'?'
 Ambaŭ mortos post moment':
 oni ja al ŝi ne kredus,
 ke ŝi sola tiel predus,
 kaj pro kia bona ŝanc'
 do aperis la ĵetlanc'?'
 Tute lasi mortan beston?
 Estus stulte. Manĝon, veston
 tre bezonas ŝia gent',
 sen viando en turment'.
 Kaŝi viandon – krim terura.
 Jen demando plej tortura!
 (Daŭrigota)

Rakonto: La Sterniĝarbo

(*Verhaal: De boom die zich neerlegt*)

En la Ekstrema Nordo, ĉe la limo inter tajgo kaj tundro, inter nanaj betuloj, malaltaj sorparbustoj kun neatendate grandaj, helflavaj, akvoplenaj beroj, kiuj atingas maturecon je tricentjara aĝo, vivas neordinara arbo – la sterniĝarbo. Ĝi estas fora parenco de la cedro,

Ĉiamverda konifera arbusto, kun trunkoj iom pli dikaj ol homaj brakoj kaj du-tri metrojn altaj.

La sterniĝarbo estas senkaprica kaj kreskas alkroĉiĝante per la radikoj je la ŝtonaj fendoj de monta deklivo. Ĝi estas kuraĝa kaj obstina kiel ĉiuj nordaj arboj, ĝia sentivo estas eksterordinara.

Estas malfrua aŭtuno, delonge estas tempo por neĝo, por vintro. Dum multaj tagoj laŭ la rando de la blanka firmamento moviĝas malalte pendantaj nubegoj ekimozoj¹ bluaj. Sed hodiaŭ matene la aŭtuna trapenetranta vento iĝis minacante kvietita. Ĉu odoras je neĝo? Ne, ne neĝos, ĉar la sterniĝarbo ankoraŭ ne kuŝiĝis. Kaj tagoj pasis post tagoj, la neĝo ne venis, la nuboj vagis malantaŭ la montetojn, kaj en la altan ĉielon leviĝis pala, malgranda suno, kaj ĉio estas kiel en aŭtuno.

Sed la sterniĝarboj ekkliniĝas. Ili kliniĝas ĉiam pli malalten, kvazaŭ sub senmezura, ĉiam kreskanta pejzaĝo. Per siaj suproj ili gratas la ŝtonojn kaj alpremiĝas al la teron, etendante siajn smeraldajn branĉojn. Ili sterniĝas. Ili estas similaj al polpoj ornamitaj per verdaj plumoj. Unu tagon, du tagojn ili kuŝe atendas, kaj jen el la blanka ĉielo jam surŝutiĝas neĝo kiel pulvoro! La sterniĝarbo mergiĝas en vintran dormadon kiel urso. Sur la blanka monto ŝvelas neĝovezikoj – tio signifas, ke la sterniĝarboj kuŝiĝis por sia vintrodormo.

Sed en la fino de vintro, kiam neĝo ankoraŭ kovras la teron per trimetra tavolo, kiam en la intermontejoj la neĝventegoj batpremias la densan neĝon, homoj vane serĉas signojn pri printempo en la naturo. Laŭ la kalendaro la printempo devus jam alveni, sed ne distingiĝas la tago de la aliaj vintraj tagoj. La aero estas maldensa kaj seka, ne diferenca de la januara aero. Tamen la sentoj de homo estas tro krudaj, liaj perceptoj estas tro simplaj. Kvankam li havas kvin sensorojn, tio ne sufiĉas por aŭguroj kaj divenado.

La naturo estas pli delikata ol homo en siaj sentoj. Ni scias ja ion pri tio. Ĉu vi memoras fiŝojn de la salmospecioj, enirantajn por fraji nur en tiun riveron, kie estis frajita la frajero, el kiu evoluis ĉi tiuj fiŝoj? Ĉu vi memoras la enigmoplenajn vojojn de la birdaj migroj? Ne malmultaj barometroplantoj, da floroj barometraj estas konataj al ni. Kaj jen meze de la

neĝa senranda blanko, meze de plena senespero, neatendate ekstaras la sterniĝarboj. Ili forskuas la neĝon, rektiĝas en sia plena staturo, levas al la ĉielo sian verdan, glaciigintan, iomete flavruĝetan pinglaron. Ili aŭskultas la vokon de la printempo, nepercepteblan por ni kaj, kredante ĝin, ekstaras plej frue en la nordo. La vintro finiĝis!

Okazas io alia: lignofajro. La sterniĝarboj estas facilcredemaj. Ili tiel malŝatas vintron, ke ili emas kredi je la varmo de lignofajro. Se vintre apud fleksiĝinta trunko iu faras lignofajron, la sterniĝarbo ekstaras. Kiam la lignofajro estingiĝos kaj la senluziĝinta sterniĝarbo, plorante pro la ofendo, denove kurbigigas, ĝi denove kuŝiĝas sur sian malnovan lokon. Kaj neĝo denove kovros ĝin.

Ne, la sterniĝarbo estas ne nur aŭguranto de la vetero. Ĝi ankaŭ estas la arbo de espero, la unusola ĉiam verda arbo en la Ekstrema Nordo. Inter la blanka neĝbrilado ĝiaj senbrilverdaj pinglobranĉoj parolas pri la sudo, pri varmo kaj vivo. Somere ĝi estas modesta kaj nerimarkebla. Ĉio ĉirkaŭe haste disvolviĝas, penante plene flori dum la mallonga norda somero. La floroj printempaj, someraj, aŭtunaj kursuperas unuj la aliajn en neretenebla impeto florado, sed aŭtuno alproksimiĝas, kaj jen ŝutiĝas jam malgrandaj, flavaj pingloj, nudigante la larikojn, falas kaj sekiĝas sur la palflava herbo. Malpleniĝas la arbaro. Kaj tiam videblas, ke super la palflava herbo kaj griza musko brulas inter la arboj la grandegaj verdaj torĉoj de la sterniĝarboj.

Mi ĉiam imagas la sterniĝarbon kiel la plej poezian rusan arbon, pli bonan ol la glorataj plorsaliko, platano aŭ cipreso.

Varlam Ŝalamov (1907-1982)

*Esp. traduko: Olga Goriĉenko,
Murmansko, Rusio*


La ruĝbarbulo ege ruza... Jen libro nepre leginda!

Renardo Vulpo. Mezepoka bestepepo.

El la mezepoka nederlanda tradukis kaj en Esperanto prilaboris Pieter Jan Doumen. Hechtel-Eksel: P.J. Doumen, 2009, 164 p., 21 cm. Prezo: € 15,00

Iom mirigas la titolpaĝo: temas ja ne pri originala verko de s-ro Doumen, sed pri traduko-prilaboraĵo lia pri ege fama mezepoka epopeo el la flandra-nederlanda literaturo *Van den Vos Reynaerde*.

¹ Ekimozo: diverskolora makulo sur la haŭto rezultanta de sanga enfiltriĝo aŭ kontuzo (PIV).



Kial “traduko-prilaboraĵo”? Ĉar unuflanke estas traduko – enhave –, sed aliflanke – laŭ la forma aspekto – estas ne tute traduko: la mezepoka nederlanda literaturo ofte uzas formon, kiun en Esperanto ne eblas inde redoni. Mezepoke oni ja uzis rimatajn versojn de malegala longeco kun iom stabila nombro da akcentitaj silaboj inter pluraj neakcentitaj. En Esperanto, se konsideri nian ĝisnunan literaturan tradicion, tio nepre aspektus harstariĝe ĥoase. Ankaŭ mi mem, tradukante *Beatrijs*, mezepkan Maria-epopeeton, siatempe mi elektis principe la saman solvon kiel Pieter Jan Doumen: versoj sen rimoj, sed egalan longecon. Do – tute bona solvo pri la forma aspekto!

La verko mem estas vera atuto de mezepoka literaturo ĝenerale: post la latinlingva epopeo samtema, ĝi estas la unua nacilingva epopeo pri la ruza vulpo, kiun plurlingve poste oni imitis – ne nur en la franca; poste eĉ Goethe provis rivali kun ĝi en siaj heksametroj germanaj!

Kiel ajn: renardo estas leginda ruzulo, kiu kulpas pri pluraj murdoj – vulpo ja manĝas kokojn – sed kiu ne facile sin lasas superruzi. Plurajn gravulojn la reĝo de la bestoj, Reĝo Nobel la leono, elsendas por kunveni Renardon al sia kortego, kie oni procesu pri li kaj lia kulpo. Konate estas ekzemple, kiamaniere la

urson Bruno li scias kapti: al Bruno Renardo kredigas, ke en displitita arbo en ĝia spalto¹ kaŝiĝas pura mielo... Kiam la urso ekflaras, la vulpo forpuŝas la kojnon el la spalto, la fendita arbotrunko ree kuniĝas kaj la buŝo de la kompatindulo estas kaptita... Multe da ruzaĵoj elpensas ankoraŭ la vulpo por savi sin kaj sian familion.

Kutime la traduko estas sufiĉe bona, kvankam mi bedaŭras, ke la traduko iom pli longas ol la originalo.

Tamen, precipe pri unu detalo en la teksto mi vere ekmiris: en paĝo 64 la origina *des papen son[s]*, ([de] la filo de la pastro) estis tradukita kiel la *kirkservista filo*. Temas dum pluraj siatempej paĝoj pri aventuro ĉirkaŭ la logejo de tiu pastro, kiu – kiel pluraj siatempej pastroj – senprobleme havis edzinon kaj ankaŭ idojn². Sed mirige por mi en la traduko tiu pastro – *pape* – ŝanĝiĝis je *preĝeja pedelo / kirksevisto / sakristiano* (p. 64, 66, 67). Je granda bedaŭro de sia edzino, atakate de trompita virkato li perdas la “kariljonon”.

Post pluraj aventuroj nia Renardo fine eĉ decidis entrepreni pilgrimadon.

Sed vi legu la tuton – vere estas verko edifa!

Kompreneble, kiel atentigas Christian Declerck en sia *Rekomende*, tia verko bezonas enkondukon kaj notojn. Kaj da tiaj la tradukinto liveras plurajn, ne tro malavare sed ja informriĉe.

Pieter Jan Doumen estis instruisto mezlerneja pri la angla kaj la franca; kiel esperantisto li estas precipe aktiva en la Limburga Esperanto-Asocio. Tio ĉi estas lia unua granda traduko. Gratulon al li. Eble – kaj bonvene! – li sentos instigon daŭrigi, kaj por tio volonte mi sugestu al li *Karel ende Elegast*...

Gerrit Berveling
El ‘*Esperanto*’, marto 2010

Tiu Esperanto-traduko de la aventuroj de la ruza vulpo Renardo estas ankoraŭ ĉiam havebla ĉe FEL, UEA aŭ ĉe Pieter Jan Doumen. Ĝuu ankaŭ vi, kiel tiom da aliaj esperantistoj, tiun amuzan kaj samtempe krudan rakonton pri la ruza vulpo.

¹ fendo

² Malgraŭ pluraj lokaj aŭ diocezaĵaj reguloj kaj verdiktoj, vere deviga por la kompleta eklezio de Romo la celibato fariĝis nur de post la koncilio de Trento (16-a jarcento).

Vulkanerupcio venkis Napoleonon (*Vulkaanuitbarsting versloeg Napoleon*)

Antaŭnelonge la tuta aviadilcirkulado al kaj de Eŭropo devis esti malpermesita pro erupcio de vulkano en Islando. Gigantaj grizaj kaj nigraj polvonuboj estis lanĉitaj el la kratero ĝis tre alte en la atmosfero kaj drivis orienten kaj sudorienten, dum griza cindro kovris la ĉirkaŭaĵon de la vulkano.

Vulkanerupcio okazas, kiam vulkano pro la alta premo en la magmoĉambro puŝas la magmon supren tra la kratero al la krateraperturo. Se la magmoĉambro estas tute plena, la forto de la erupcio dependas de la kvanto da gaso kaj silicio en ĝi. La kvanto da silicio determinas la viskozecon de la magmo. La kvanto da akvo en la miksaĵo povas esti ŝanĝata en tre eksplodemana vaporon.

Ankaŭ obstakloj influas la naturon de erupcio. Se la kratero estas fermita per lafobulo aŭ per akumulado de pumiko, la premo en la kratero rapide kreskos kaj kaŭzos erupcion.

Se magmo atingas la tersufaĉon, oni nomas ĝin lafo. Lafo povas eliri el la kratero kiel likvaĵo, sed ankaŭ esti ĵetata en la aeron kun enorma eksplodoforto. Kune kun lafo ankaŭ pecoj de roko povas esti deŝirataj el la vulkan-

**BOUW
EXPO
TEGELEXPO
MIX-BETON
BOUWMATERIALEN**
DE LAAGSTE PRIJS DE HOOGSTE KWALITEIT,
EN ONZE EXTRA SERVICE ZIJN ONZE KENMERKEN!
PAESEN
EEN ZAAK VAN VERTROUWEN!
TEGELEXPO BOUWEXPO
☎ 011 66 55 54
☎ 011 66 55 50

interno kaj esti lanĉataj eksteren. Tiajn pecojn da vulkanroko ni nomas piroklastaj¹ rokoj. Tiuj pecoj refalas sur la teron en diversaj formaj kaj formatoj:

Polvo: eroj pli malgrandaj ol 1/100 cm. Polveroj povas disvastiĝi sur grandegaj distancoj.

¹ Piroklastaj² de la grekaj vortoj: pyr (fajro) kaj klasma (restaĵo).

Ĉe forta erupcio ili povas esti transportataj plurfoje ĉirkaŭ la teron.

Cindro: eroj kun diametron malpli grandaj ol 1/10 cm. La pli granda kvanto da cindro falas sur la tersurfacon kaj formas kune kun pluvakvo rokecan amason: vulkantofo.

Bombo: peco da freŝe solidiĝinta lafo, kiu ricevas rondan formon, dum ĝi flugas tra la aero.

Bloko: ankaŭ peco da freŝe solidiĝinta lafo, sed kun akraj anguloj.

Karboskorio: peco da vulkanroko plenigita per bobeloj, formita de likva lafo malvarmigita en la libera aero.

Pumiko: peco da karboskorio plena je tiom da aero, ke ĝi povas flosi sur akvo.

La aktiveco de vulkano determiniĝas laŭ la nombro de siaj erupcioj. Vulkano povas esti aktiva, regule aktive, dormanta aŭ estingiĝinta. Aktivaj vulkanoj daŭre erupcias, aliaj vulkanoj faris tion intermite. Dormantaj vulkanoj faras



nenion, sed ne sufiĉe longe por povi konkludi, ke ili neniam plu erupcios. Estingiĝintaj vulkanoj faris nenion ekde memoreblaj tempoj.

En 79 p.K. erupcio de Vesuvio en Italio – la sola aktiva vulkano sur la eŭropa kontinento – enterigis la urbojn Herkulaneo kaj Pompejo sub dikega tavolo de cindro. Ekzistas okulatesta raporto pri tiu katastrofo skribita de la romiano Plinio la Pli Juna. La homoj ne havis la tempon eskapi al la katastrofo kaj estis kaptita en dikega tavolo de cindro.

Erupcio de supervulkano elĵetas tiom da polvo en la atmosferon, ke parto de la sunlumo ne atingas la teron kaj sekve la temperaturo de la tero signife malaltiĝas.

Tiel sciencistoj asertas, ke giganta vulkanerupcio en Ameriko kaŭzis tro fruan komencon de vintro en Rusio en la aŭtuno de 1812 kaj tiel kontribuis al la neniigo de la Granda Armeo de la franca imperiestro Napoleono, kiam tiu ĉi retiriĝis el Rusio. Nur kelkaj miloj da soldatoj transvivis la teruran reiron.

Ĉu sonĝoj estas vere trompaj?

(Zijn dromen echt bedrog?)

Kial ni forgesas niajn sonĝojn? Kiel fariĝas, ke iuj homoj vekigigas matene, memorante sian sonĝon, dum aliaj memoras nenion.

Laŭ la sciencistoj ĉiuj homoj sonĝas. Ankaŭ la homoj, kiuj diras: “Mi neniam sonĝas, aŭ maksimume unufoje en du semajnoj”. Tiu situacio estas bedaŭrinda, ĉar la sciencistoj asertas, ke la sonĝoj, kiujn ni vidas dum nia dormo, povas esti tre utilaj por ni kaj por aliaj. Ili povas ekz. helpi nin pli bone kompreni nin mem aŭ fari ĝustan decidon.

Specialistoj konstatis, ke la homoj ne multe diferencas inter si en tio kio koncernas la nombron da sonĝoj dum unu nokto. Tial la diferenco devas troviĝi en la kapablo forgesi ilin. Tial ili parolas pri ‘sonĝoforgesantoj’ kaj ‘sonĝomemorantoj’.



Ofte oni diras, ke homoj, kiuj vekigigas malrapide, pli emas memori siajn sonĝojn, ol tiuj, kiuj estas vekataj per subita stimulo, ekzemple per vekhorloĝo.

Sed laŭ la sciencistoj tiu aserto ne estas vera. Precize la homoj, kiuj estas vekataj rapide, memoras pli pri siaj sonĝoj, ol la homoj, kiuj vekigigas malrapide. Tio signifas, ke sonĝo estas rapide forviŝata inter dormo kaj vekigado.

Aliaj eksperimentoj demonstris, ke la sonĝoforgesantoj ofte bezonas pli fortan stimulon por vekigi, ol la sonĝomemorantoj. Tio povas signifi, ke tiuj for dormas pli profunde, ol tiuj ĉi. Kaj tio siavice povas signifi, ke unu kaŭzo kial homoj estas sonĝomemorantoj, estas ke ili pli ofte vekigigas nokte kaj tial pli facile memoras siajn sonĝojn, ol la sonĝoforgesantoj.

Tamen la plej multaj spertuloj pensas, ke la diferenco inter sonĝomemorantoj kaj sonĝoforgesantoj estas pli demando de psikaj karakterizoj de ilia personeco ol de profundeco de ilia dormo aŭ la maniero vekigi.

Malgraŭ ĉiuj tiuj sciencaj ekzamenoj la demando kial homoj forgesas siajn sonĝojn restas nesolvita...

La Limburga Esperanto-Asocio *(De Limburgse Esperantovereniging)*

Aktivaĵoj en marto kaj aprilo 2010:

Ĵaŭdon, la 25-an de marto, sep esperantistoj kuniĝis por kanti kune Esperantlingvajn kantojn. Paul Hotterbeekx ĉiam akompanis la kunkantadon sur sia gitaro kaj interpretis ankaŭ kelkajn solonumerojn en nia lingvo.

Ĉiuj esprimis la deziron regule fari tion..

Ĵaŭdon, la 30-an de aprilo, An Olijslagers prezentis kaj komentis Esperantajn proverbojn laŭteme. La anoncita nederlandano Rob Ketelaar ne povis veni kaj pruntis al An la tutan bezonatan materialon. Gratulon, An!

Aktivaĵoj en majo kaj junio 2010:

Ĵaŭdon, la 27-an de majo, laŭ decido de la estraro, okazos **ĝenerala kunveno** de ĉiuj membroj de LEA kun elekto de nova estraro. La turisma promeno tra Peer estas prokrastita. Komenco: 20h00.

Ĵaŭdon, la 24-an de junio, ni ludos ‘petankon’, la konatan sudfrancan globetludon, sur la privata petankotereno de Jan Doumen, Peerderbaan 81, Hechtel. Petankoglobetoj estas disponeblaj. Komenco: 20h00.

Ŝi / li preferas la amon de besto

(Zij / hij verkiest de liefde van een dier)

El ekzameno aperas, ke unu el kvin homoj preferas la kompanion de sia hundo aŭ kato al tiu de sia partnero. Nur 10% de la francoj, kiuj tradicie alte estimas romantikismon, preferas pasigi sian liberan tempon kun sia haroza amiko anstataŭ kun sia partnero. En Meksikio, Nederlando kaj Hungario la procento estas iomete pli alta. La turkoj preferas resti kun sia dombesto en preskaŭ duono de la kazoj, eĉ en la Tago de Sankta Valentino! Aliaj landoj, kie homoj donas pli da amikeco al sia dombesto ol al sia edzo aŭ edzino, estas Hindio (41%), Japanio (30%), Ĉinio (29%), Usono (27%) kaj Aŭstralio (25%).

El la enketo ankaŭ aperis, ke la grupo, kiu tendencas preferi hundon aŭ katon al sia partnero, havas averaĝe pli malaltajn enspezojn. Sed ankaŭ aĝo ludas gravan rolon. Ju pli juna oni estas, des pli facile oni preferas sian kvarpedulon. Kvarono de la homoj sub 35 jaroj, preferas sian dombeston. Ĉe la 35- ĝis 54-jaruloj tion faras 18%, kaj ĉe la pli ol 55-jaruloj 14%.